

## & En la tombejo:

< Rekante 21 el 37 batoj por strofo, entute 222 paŝoj dum 3 minutoj. Verkis Julio Baghy (Preter la vivo, Budapeŝt 1923). Baladigis Martin Strid (2017) per sama melodio kiel por Interkona balado minore kaj simila rekantaĵo.>

### (#Melodio:

(#Minore: /LaLa LaaSiSi LaTi do;re mimi miidodo LaaLa;La Lado; Tido TiiSiSi MiSi Ti;do LaLa LaaSiSi LaaTi;Ti dore;)

(#Rekantaĵe: mi mido LaLa Lado; mimi remi fami; rere reTi SoSo SoTi; rere dore mire; doTi LaTi dore miSi La La a)

)×6 )+

### (&Strofoj:

'1 /En tombejo vagadis mi. ; Loganta gesto de l' morto ; min vokis. ; Nuda rido de homkrani' ; ĉe l' vojo plende pri l' sorto ; nur mokis.

(×: **Dankon! La lokon donu ; dekstren en la ĉeno ; ke ni ankaŭ tiun konu ; ĝojaj ĝis reveno ; kaj aŭskultu ĉion ĝis mateno.**)

'2 Mi, kun tim' de vivanta hom' ; rifuĝi penis, sed vane, ; per kuro, ... ; ĉar ĉi nevidebla fantom' ; min pele sekvis rikane... ; Teruro! .....

'3 "Vin mi volas ankoraŭ Viv'!" ; eliĝis krio de l' koro ; naiva. ; "Supren! Supren! Ne al dekliv'! ; Barakti eĉ en doloro, ; sed viva!" .....

'4 Penso pri la putranta karn' ; pri la postmorta nenio ; plorplendis ; kaj subite por mia larm' ; kompaton dolĉan la Dio ; alsendis. ....

'5 Sur tombaro la flor', cipres' ; odoron spiris: vivantan ; konsolon ; kaj komprenis mi en konfes' ; de muta vorto konstantan ; simbolon. ....

'6 "Novan vivon ja naskas la mort'! ; Nin vidu! KREDU sen tremo, ; doloro!" ; Por ĉi muta konsola vort' ; mi dankas Vin per poemo, ; Sinjoro!! .....